

La Riverego

Vintro de 1998-99

Esperanto-Societo Kebekia

N^o53^o, Jaro 13^o

Okjara migrado ĉirkaŭ la tero

Zdravka Metz

Ĉi-printempe mi komencis legi libron en la franca lingvo kiun rekomendis al mi eksinstruistino laŭ profesio, naskita en Francio kaj nun loĝanta en Kebekio. Ŝi, tuj post la legado, serĉis E-klubon en Montrealo, ĉar ŝi nepre volis relerni la internacian lingvon. La libron *Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ la tero* mi tuj ekŝatis sed mi ne sukcesis finlegi. Mi devis redoni ĝin. La Libroservo mendis ĝin kiam ni eksciis ke aĉetblas esperantlingva eldono.

Kaj jen nun mi ĝuas legante. Samtempe mi vojaĝas kun la aŭtoroj, sentas varmecon, nubon de polvo, belecon de Tahitia paradizo, aŭ nesekurecon, kiun foje priskribas tiu kuraĝa juna paro. Ankaŭ mi kunsentis gastamon, amikecon, familiecon de Esperantaj familioj kiujn ili foje vizitis. Mi samopiniis kun ili kiam ili priskribas iun novan rilaton kiu pro Esperanta kontakto kreas kvazaŭ delongtempan konon de la persono kaj pro tio permesas al Esperantisto starigi plej diversajn demandojn.

Kiam ili forlasis sian vilagon por ĉirkaŭiri la mondon, ili planis resti nur dum kvar jaroj. Certe, la kono de Esperanto helpis ke ili plilongigu kaj realigu sian planon — viziti vilaĝojn kaj ne ĉefurbojn kaj, kiel ili skribis *ni diskutis samrajte pere de nia komuna*

lingvo, Esperanto. Laŭ ili tiu *freŝdata sperto komunikis al ni la Esperanto-viruson*. Ili vivis neforgeseblajn aventurojn dum ok jaroj portante 15-kilograman dorso-sakon, revenis sian vilaĝon kun adoptita knabeto kaj la vivsekreto — la viv-ĝojo ne kusas en la celo havi, sed esti.

Mi invitas vin legi kaj lerni geogra-

fion, kulturon, politikon, ĉar ĉi libro estas samtempe amuza kaj eduka kies detalaj priskriboj alproksimigas la mondon en nia domo kaj ĝi (la vasta mondo) fariĝas tuŝebla kaj sentebla.

Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ la tero. De Maryvonne kaj Bruno Robineau. Prezo: 44,35 \$

Raporto pri ISE

Matthew Chisholm

Un jeune Torontois invite les lecteurs à participer à des rencontres comme celle qui a eu lieu à Okemo en octobre dernier.

Okazis de la 10^a ĝis la 12^a de oktobro la kvina Internacia Semajnfino Esperantista (ISE) ĉe la monta feriejo Okemo apud Ludlow, Vermonto, Usono. Ĉeestis el la membraro de JEK Aaron Chapman kaj Matthew Chisholm. Ĉi tiun ĉiujaran okazaĵon organizas la Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj Esperantistaj asocioj kaj kluboj en Usono, kun la celo kunigi Esperantistojn el orienta Kanado kaj nordorienta Usono. Ĉi-jare ĉeestis la renkontiĝon proksimume 40 homoj. Kutime ĝi allogas pli, sed ni spertis pli intiman aferon ĉi-jare kaŭze de la antaŭnelonge jam okazinta NAKE. Okemo estis elektita kiel loko por la renkontiĝo ĉar ĝi situas mezloke inter

la kvar urbegoj Montrealo, Bostono, Novjorko, kaj Toronto.

Aparte de la prelegoj, kiuj kutime okazas ĉe Esperanto-kunvenoj, estis la interkonatiĝa vespero, kaj la kultura vespero kun kooperativa festomanĝo — ambaŭ bonegaj oportunoj konatiĝi kun samideanoj. Por vere sperti la plena ĝuo de Esperantisteco, oni nepre ĉeestu iam Esperantan renkontiĝon aŭ kongreson. Tion mi forte rekomendas. Ĝi helpus vin ne nur per plibonigo de via kono de nia lingvo (kiu certe gravas!), sed ankaŭ ĝi donus al vi oportunon sperti Esperantan kulturon. Nian kulturon! [*El Juna Alumeto*, n^o 18^a, septembro 1998]

Radio verda : la voĉo de Esperantujo

Aaron Chapman

Radio Verda estas nova radiostacio Interreta, kiu celas esti la voĉo de Esperantujo. Ĝi elsendas ĉiusemajn-ajn programojn, kiuj konsistas precipe el anoncoj kaj artikoloj proponitaj de Esperantistoj ĉirkaŭ la mondo.

Aarono Chapman, de Otavo, iniciatis la aferon. Li diras, ke ĝis nun, ne ekzistis radielsendejo, kies programoj estas rete atingeblaj kaj plene internaciaj. Ja estas la tre bonaj programoj el Pollando kaj Estonio, sed ili konsistas grandparte el aktualaĵoj, specifaj pri sia lando.

La programoj de *Radio Verda* estas faritaj de sendependaj Esperantistoj; tial, ili povas esti kiel eble plej variaj kaj interesaj. Tio tute dependas je la aŭskultantaro. *Radio Verda* estas kvazaŭa spegulo, kiu konvertas en sonojn la informojn kaj interesajojn el Esperantujo.

Kutime, oni kontribuas per retroŝta mesaĝo, sed estas eble sendi ankaŭ

sondosieron (por ke via propra voĉo aŭdiĝu dum la elsendo!). Nova programo aperas ĉiudimanĉe, kaj oni aŭskultas el <www.comnet.ca/~chapman/verda.htm> per la softvaro *RealAudio*. La elsendo haveblas ĝis la apero de la sekva, sed, se vi maltrafas specifan programon, vi povas

retpoŝte peti pasintan el la arĥivo.

Radio Verda ekzistas pro kaj per kontribuoj. Bonvolu aŭskulti, sed ankaŭ nepre sendu la propran anoncon, artikolon, opinion, aŭ alian interesajojn por senpage diskonigi ĝin!

Interna afero por ekstera informado

Comment la vie démocratique de l'Association mondiale d'espéranto peut servir de prétexte à un article dans un journal local de Floride.

Antaŭ la Montpeliera UK la individuaj membroj de UEA elektis siajn reprezentantojn en la Komitato de UEA, la t.n. komitatojn B. Unuavide tio ŝajnas pure interna afero, kiu ne interesas ekstermovadan publikon. Usona esperantisto Arland R. Meade el Bartow, Florido, tamen lerte kaptis en ĝi okazon por doni konkretan ekzemplon pri efektiva internacieco per Esperanto. Li sendis jenan artikoleon al sia loka gazeto, *The Polk County Democrat*, kiu aperigis ĝin la 29^{ma} de junio:

ankaŭ ne scias la mian. Mi tamen povis fari mian decidon leginte iliajn biografietojn kaj organizajn celojn. Ĉio tio estis en la internacia lingvo Esperanto.

Se iu leganto deziras scii pli pri ĝi, mi volonte respondos al leteroj. [Sekvas la adreso.] Ankaŭ en la biblioteko de Bartow oni povas trovi librojn pri Esperanto.

La elekto de la Komitato de UEA neniel tuŝas la vivon en la regiono de la gazeto. Kial do la redakcio akceptis tiun tekston? Ĝi trovis la tekston interesa, ĉar ĝi prezentas nekutiman personan sperton de leganto.

S^{mo} Kalle Kniivilä, estrarano de UEA pri informado, skribas en la oktobra numero de *Esperanto* pri la graveco de personaj spertoj en la informado pri Esperanto. S^{mo} Meade donis imitindan ekzemplon pri tio. [El la *Gazetaraj komunikoj de UEA*, n^o 15]

Adieu aux florins

Vu que le siège de l'Association mondiale d'espéranto (U.E.A.) est aux Pays-Bas, le florin (en espéranto : guldeno) est devenu ni plus ni moins la monnaie espérantiste. Le prix des livres est en florins, la cotisation de base de l'U.E.A. est en florins, de même que les comptes que tout un chacun peut détenir auprès de l'association. Eh bien, cette situation prendra fin avec l'année 1998. C'est en euros, la nouvelle monnaie européenne, que toute la comptabilité de l'U.E.A. se fera désormais.

Esperanto parolata ĉe ni

Legantoj de *The Polk County Democrat* certe havas diversajn spertojn pri internacia aktivado. Ĉu iu el ili tamen similas kun tio ĉi:

Mi ĵus sendis balotilon al Nederlando voĉdonante por 8 el 16 kandidatoj por funkcio en internacia organizaĵo. Mian voĉon ricevis kandidatoj el Koreio, Bharato, Kostariko, Ĉinio, Hispanio, Ruslando, Israelo kaj Japanio.

Mi scipovas la gepatran lingvon de neniuj el tiuj kandidatoj, kaj ili eble

La Riverego (Le fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 110 exemplaires sur papier recyclé. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 110^{mo} sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / limdato por la venonta numero : 1999.03.01.

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Bruce Arthur, Suzanne Bolduc, Aaron Chapman, Matthew Chisholm, Michel Clément, Normand Fleury, Matthew McLauchlin, Zdravka Metz, Michel Perreault, U. Paul Ronald kaj Yvon Roux. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Zdravka Metz kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur et télécopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo: (514) 272-0151

esperanto@sympatico.ca

<http://www3.sympatico.ca/esperanto>

Esplori niajn verdajn radikojn

Normand Fleury

Deux membres de la S.Q.E. sont récemment allés à Saint-Hyacinthe pour étudier des archives nous éclairant sur les débuts de l'espéranto au Québec et en Amérique. Voici les premiers résultats de leurs recherches.

Michel Clément kaj mi iris al Maskuto meze de oktobro por esplori la arkivojn de *Grand Séminaire de Saint-Hyacinthe* kie vivis, fine de sia vivo, la pastro Solis.

Ni volis esplori la sekvajn demandojn: Ĉu vere li estis la unua Kebekia, eble eĉ Amerika, Esperantisto? Kiam li mortis? Sekve kiom longe li aktivis?

Pri la unua demando, ni devus unue esplori en Usono, ĉe ELNA (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko), ĉu ĝi havas informojn pri la komenciĝo

de Esperanto en Usono. Nur post tio ni povos scii ĉu Solis estis la unua.

Kiel vi povos legi en la sekva artikolo de Michel, ni eksciis kiam Solis eklernis Esperanto kaj ankaŭ kiam li mortis. Bedaŭrinde ke akcidento kaŭzis lian morton, ĉar li vere vigle aktivis ĝis tiu momento.

Ni intencas reiri al Maskuto por plu esplori ĉar ja estus interese scii, kiu informis pastron Solis pri la ekzisto de Esperanto. Ŝajne tamen, la respondo estos ĉar li interesiĝis pri lingvoj. Li fakte eklernis volapukon sed tuj transiris al Esperanto kiam li aŭdis pri

ĝi.

Estas interese tralegi dokumentojn pli ol cent jarojn malnovajn. Ne ĉiam facilas lige la manskribaĵojn sed ja pli facilas al ni tion fari ol al la tiea arkivisto, kiu ja ne scias Esperanton...

Zamenhofa tago Tago de E-kulturo Tago de E-libro

Jen tri novaj libroj

1. *Al lingva demokratio — Towards Linguistic Democracy— Vers la démocratie linguistique.* Trilingva faka, dokumentita, interesa libro, redaktita de Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Prezo: 17,75 \$

2. *Zamenhof kaj judismo.* De André Cherpillod. 61-paĝa dokumentita libro pri judismo kaj filozofio de Zamenhof. Prezo: 17,75 \$

3. *Kio ni estas kaj kion ni celas. Komentoj pri Manifesto de la movado por la internacia lingvo.* 15-paĝa broŝurita — Provizora eldono — klarigo de konataj Esperantistoj pri sep oftaj temoj: demokrateco, transnacia edukado, pedagogia efikeco, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo. Prezo: 3,75 \$

Tutalfabeta frazo

ESKano Mateo McLauchlin elpensis la jenan frazon, kiu enhavas ĉiujn literojn de la Esperanta alfabeto: *Ricevu preskaŭ freŝegan Ĉeĥan huzan manĝaĵon de Bjalistok.* Ĉu vi kapablas fari same?

La Riverego 3

Ĉu la pastro Solis estis la unua Esperantisto en Norda Ameriko?

Michel Clément

François-Xavier-Isaïe Soly/Solis naskiĝis en vilaĝo Marieville (Kebekio) la 29^{an} de januaro de 1832. Li estis la filo de Pierre Soly, fandisto, kaj de Théodiste Benjamin. Li lernis en la pastrolernejo de Makusto (50 km de Montrealo) inter 1844 kaj 1856 kaj pastrigiĝis la 17^{an} de majo de 1856 fare de Lia Episkopa Moŝto Jean-Charles Prince. Li vikariis dum multaj jaroj tra la regiono kaj en Usono (Worcester kaj West-Gardner, Mass., inter 1883 kaj 1887). Li retiriĝis en 1887 en la maskutan pastrolernejon kaj poste lernis, tradukis, korespondis kaj verkis Esperante. Li mortis en 1903 pro akcidento.

Laŭ dokumentoj (*Le clergé canadien-français* kaj *Histoire du séminaire de Saint-Hyacinthe*) el la privataj arkivoj de la maskuta pastrolernejo, li lernis Esperanton kiam li emeritiĝis, eble en 1892, sed ni ne scias kiu lin enkondukis al la lingvo. Li fondis la

revuon *L'espérantiste canadien* kaj tradukis kelkajn kebekiajn rakontojn kaj romanon de fama kebekia verkistino, Laure Conan (1845-1924), *L'oublié* (1900), premiitan de la Académie française. Li korespondis kun multaj Esperantistoj, kiel René Lemaire, Grabowsky, Louis de Beaufront, sed bedaŭrinde ni havas nur kelkajn dekojn da leteroj de tiuj personoj; strange, ni ne trovis korespondaĵojn kun L. Zamenhof. Fakte, li estis agema dum 11 jaroj kaj influis la movadon en Kebekio, kaj eble ankaŭ en tuta Norda Ameriko. Li batalis por la lingvo kiam la gazeto *La Presse* publikigis la 5^{an} de aprilo de 1899 artikolon de André Theuriet (1833-1907) kontraŭ Esperanto (tiu artikolo estis publikigita antaŭe en la franca gazeto *Le Journal* en 1899); li vigle respondis en tiu gazeto la 8^{an} de aprilo de 1899, kio estis unu el la multaj agoj de pastro Solis por Esperanto.

NAKE-intino parolas

Liz Raible

Une participante américaine au NAKE raconte son expérience montréalaise — c'était la première fois qu'elle *parlait* esperanto.

I bit my lips and listened hard, trying to decipher the words, to understand them, to reply intelligibly. Huh? Oh, bone, kaj vi? Liz Raible, Louisville, Kentucky, um... oh yeah, I registered, whoops already picked up my name tag — smile — okay, bag, lots of brochures, nice, gee thanks... and a schedule, how handy — smile again — dankon, ĝis. I turned around, only to face another group of Esperanto-speakers behind me, but I was not disheartened: I had succeeded in receiving and communicating information orally in Esperanto for the first time — perhaps a small step for mankind, but a giant step for a man.

I traveled to the North American Esperanto Conference without having spoken Esperanto before, not knowing what to expect — who the people would be, what we would do, if I would even understand anyone. I had a year and a half of studying and writing Esperanto underneath me, plus any language skills I had developed from studying Spanish, so I felt that as long as I kept a positive attitude and a quick mind I could take on the world. Well,

Pomego

Por Esperantistoj, la pomego ne estas NovJorko, sed la Plena Manlibro de Esperanto-Gramatiko, mallonge PMEG. Temas pri verko de Bertil Wennergren, kiu sukcesis tute kontentige priskribi la Esperanto-gramatikon ne uzante fakvortojn kiel substantivo, adjekto aŭ sufiksoido, kiuj svarmas en la Plena Analiza Gramatiko. PMEG estas atingebla nur per interreto, ĉe la jena adreso: <<http://purl.oclc.org/NET/pmeg>>, aŭ tra la Virtuala Esperanto-Biblioteko: <<http://www.esperanto.net/veb>>.

4 Vintro de 1998-99

whatever of the world that spoke Esperanto and showed up at the Auberge du Parc in Montreal.

I'll admit it straight up: it was intimidating to be in an environment where everyone was speaking a language with such seeming ease, and I had to mull over every word. Would I make a mistake? I forgot the accusative a lot, and what about my rather limited vocabulary? However, I'll say this straight up as well: my fears did not matter. I had a teacher once who said that "communication is the goal of language." While not very profound, the statement is infinitely wise: communication takes place on many levels, and there in the hotel lobby were a few dozen people who understood many of them. Sure, there were trips to the dictionary, but communication does not require precise grammar. I was at home after I entered a conversation for the first time — and that first successful communication gave me much confidence. I was armed with confidence, a positive attitude, and a ready mind. I dove into the swirling pool of NAKE.

The four days (23-27 July) of NAKE in Montreal were a fantastic experience, especially for greenhorns to the world of Esperanto like myself. Once I got over the initial — albeit small — barrier of getting an Esperanto word out of my mouth, the conference offered numerous opportunities. First and, of course, most important, was the gathering of Esperantists. Like many students of the tongue, I lack the essential part of language — another person to share it with — when it comes to Esperanto. However, the group of Esperanto-speakers who attended the meeting were, as I have found most to be, not intimidating, and speckled with speakers of all levels. One of the more

interesting aspects of the group was its diversity. How many different people can there be at a North American conference?, you ask disbelievingly. The joint meeting of Esperanto groups from Canada (especially Quebec, as it is French-speaking) and US led to an interesting mixture — especially since the temptation to *krokodili* was significantly lessened by the fact that your conversant did not, perhaps, share your language.

In other matters, the events were interesting, informative and (are you seeing a pattern yet?) excellent opportunities to improve oral comprehension and knowledge of the world of Esperanto. Topics ranging from teaching strategies to the dulcimer offered a varied menu, especially for a relatively small meeting. Esperanto singing and Quebecois dancing during the *Interkona Vespero* and a presentation of David Gaines' *Esperanto-Simfonio* at the banquet added still more variety. And of course, special highlights included the excursion to old Montreal and the *Kajto* concert at the Botanical Garden.

First experiences always hold a special magic: everything is new and yet to be explored. NAKE in Montreal was my first experience in the living world of Esperanto, and as I explored the people there and the language we used, I watched the breathing language I had chased through letters and e-mails come alive finally as my ears and tongue caught it. I cannot compare NAKE with other ELNA meetings, but I have no complaints — only thanks that I and the hundred-some other attendees had the opportunity to be a part of such a meeting and create the magic that is Esperanto. [From *esperanto USA*, Vol. 34, No. 5, 1998]

Esperanto kaj impost-pagantoj

Bruce Arthur

Un espérantiste de la Saskatchewan prend contact avec une association de contribuables pour lui présenter les gains que l'espéranto rendrait possible. Article écrit en espéranto assez facile.

Esperranto havas diversajn utilojn kaj avantaĝojn. Esperanto estas kompare facila lingvo, kio estas bona ĉar oni povas instrui ĝin per malpli granda kosto ol aliajn lingvojn. Alia avantaĝo de Esperanto estas ĝia neŭtraleco, kiu ankaŭ povus malpliigi kostojn. Jen kiel. Internaciaj organizoj ofte uzas multekostajn tradukistojn anstataŭ solan labor-lingvon, ĉar membroj ne volas uzi la lingvon de alia membro kiel la solan labor-lingvon. Tamen neŭtrala Esperanto estus pli akceptebla.

Pro la kostaj avantaĝoj de Esperanto, oni supozus ke Esperanto interesus tiujn organizojn, kiuj deziras malpliigi kostojn. Ekzemple, oni supozus, ke interesiĝus la *Canadian Taxpayers Federation (CTF)*, ĉar tiu organizo propagandas, ke registaroj elspezas tro. Do mi skribis al CTF. Tamen, antaŭ ol mi klarigos la rezulton, mi skribos iom pri la organizo.

Asocio de impost-pagantoj

CTF estas organizo, kiu kontraŭas al deficitaj kaj al altaj impostoj, kaj ĝi plendas kiam registaroj malŝparas monon. La gazeto de la organizo havas proksimume 80 000 abonantojn. CTF havas sekcion en ĉiu provinco okcidente de Kebekio. La gazeto aperas nun anglalingve, kvankam CTF fanfaronas, ke la direktoro de ties otava oficejo flue parolas ambaŭ oficialajn lingvojn.

La gazeto de CTF enhavis artikolojn pri lingvaj kostoj en Kanado. Du gravaj artikoloj pri ĉi tiu temo aperis en 1994 kaj unu en 1996. La artikoloj klarigis la lingvajn kostojn de la federacia registaro: tradukado, lingva instruado por dungitoj, krom-pagoj al dulingvaj dungitoj, kaj transpagoj al la provincoj por lingvoj en lernejo. La federacia

registaro ankaŭ donas monon al *Alliance Québec* kaj al franc-lingvaj organizoj ekster Kebekio. Ĝi ankaŭ donas monon al organizoj, kiuj instruas ne-oficialajn lingvojn, kaj ankaŭ al aliaj organizoj por helpi traduki dokumentojn de la organizoj.

Kvankam CTF klare volis ŝanĝi la lingvajn politikojn de la registaro, ĝia ideoj estis malklaraj al mi. Ekzemple, ĝi diris, ke la registaro povus elspezi multe malpli se ĝi disponigus servojn en ambaŭ oficialajn lingvojn nur kie estas bezono. Mi ne scias, kiel ĝi difinis « bezono ». Ĝi ankaŭ diris, ke multaj kanadanoj kredas, ke oficiala dulingvismo estas disiga. Malklaris al mi, ĉu CTF opiniis, ke ĝiaj ideoj estus malpli disigaj.

Skribado kaj reskribado

Kiam mi skribis al CTF, mi skribis pri Esperanto, sed mi ankaŭ petis klarigojn pri la ideoj de CTF. Mi ricevis ĝentilan leteron, kiu diris ke Esperanto estas studinda ideo. Tamen, CTF apogus ĝin nur se analizo montrus, ke la gajnoj estus pli grandaj ol la kostoj.

Mi reskribis por demandi ĉu CTF havis analizon pri la gajnoj kaj kostoj de siaj aktualaj ideoj. Mi ankaŭ denove petis klarigojn pri la artikoloj, ĉar la unua letero ne respondis al miaj demandoj. Tamen CTF neniam respondis. Eble oni volis respondi sed neniu havis tempon. Aŭ eble oni ne volis serioze diskuti pri la problemo de lingvaj kostoj. Ĉu tio ĉi eblus?

Ĉiukaze, post miaj leteroj, la gazeto enhavis preskaŭ nenion pri lingvaj kostoj. Mi ne diras, ke tio estas rezulto de miaj leteroj. Tamen...

Mi aldonu, ke mi skribis al CTF ankaŭ pri la Unuiĝinta Nacioj. Artikolo en la gazeto de CTF en 1996 diris, ke UNO malŝparas monon, sed la artikolo ne

donis ekzemplon. Mi demandis, ĉu CTF opinias, ke la lingvaj politikoj de UNO estas ekzemplo de malŝparado. Oni ne respondis.

Mi pensis, ke la Universala Esperanto-Asocio havis ian analizon pri la kostoj de Esperanto en UNO. Se jes, mi povus doni tion al CTF. Tamen post enketo, mi eksciis, ke UEA ne havas tian informon. (Tio ŝajnis stranga, ĉar UEA klopodis multjare konvinki UNOn pri la avantaĝoj de Esperanto.)

Kongresoj

CTF laboras en Kanado por reprezenti la interesojn de impost-pagantoj. Ankaŭ aliaj landoj havas similajn organizojn. Ĉi tiuj organizoj kunlaboras por okazigi mondajn kongresojn de impost-pagantoj. La monda kongreso de 1998 okazis en Kanado, en Whistler (BC). Mi skribis al CTF por proponi, ke Esperanto estus bona temo por la kongreso. Tamen la organizantoj eĉ ne volis paroli pri lingvaj kostoj.

La monda kongreso de impost-pagantoj okazos en 1999 en Berlino (Germanio). Ĉar Germanio estas en la Eŭropa Unio, lingvaj kostoj estas pli grava problemo. Kaj Esperanto estas pli konata en Germanio ol en Kanado. Ja, la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Berlino nur kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso de impost-pagantoj. Do, ne estus tute eksterordinara okazo, se oni decidus debati pri Esperanto dum la kongreso de impost-pagantoj. Mi jam skribis al la Germana E-Asocio por klarigi ĉi tiun ideon.

Mikhaïl Gorbatchev, ex-président de l'U.R.S.S., a accepté un poste de professeur d'administration et de droit à l'Académie internationale des Sciences de Saint-Marin, dont la principale langue de travail est l'espéranto. [SAT-Amikaro, Service de presse, n° 533, août-sept. 1998]

Prépositions et conjonctions

Pour indiquer la fonction des mots et des propositions (éléments d'une phrase contenant toujours un verbe, souvent un sujet et parfois un ou plusieurs compléments), la grammaire de l'espéranto a recours, comme celle du français, à des prépositions et à des conjonctions. Les prépositions, comme *al, post, malgraŭ, pro, de, en*, et d'autres, se placent devant un substantif (un nom), un pronom ou un infinitif et servent à indiquer le rôle que ce mot joue dans la phrase.

Les conjonctions (plus précisément de subordination) introduisent, quant à elles, des propositions. Des exemples : *kvankam, kvazaŭ, ĉar...* Parfois, on peut transformer une préposition en conjonction en ajoutant *ke*, mais pas toujours : *avant que* se traduit par *antaŭ ol*, et *après que* devient *post kiam*. D'ailleurs, pourquoi dire *malgraŭ ke* alors que *kvankam* est disponible ?

Deux mots sont cependant à la fois préposition et conjonction : il s'agit de *dum* et de *ĝis*. On peut donc dire : *dum mia laboro* ou *dum mi laboris*, ainsi que *ĝis la celo* et *ĝis ni atingos la celon*. Alors, il est incorrect (et inutile) de dire *dum ke* ou *ĝis kiam*. La simplicité avant tout.

Zamenhof pri reformoj

Kun plezuro kaj danko mi ricevis Vian leteron. La ideojn esprimatajn en tiu Via letero mi plene aprobas. Ĝis la tempo, kiam la registaroj prenos nian aferon en siajn manojn, ni neniam devas paroli pri iaj ŝanĝoj. Vi scias kredeble, ke mi diris tion ĉi en mia parolo en la Londona Guildhall kaj mi konstante tion ĉi ripetis. Mi persone bedaŭrinde ne pova tro energie batali kontraŭ la reformistoj, ĉar se mi batalos, tiam ili diros, ke tio ĉi estas ambicio de aŭtoro, kiu pensas, ke lia verko estas perfekta ! Ili trumpetos (kiel ili faras jam nun), ke « ĉiuj plej

Iru uesten, vi junulo !

Michel Perrault

En *La Riverego*, aŭtuno de 1998, vi petis de ni demandojn pri la vortprovizo de Esperanto. Jen unu.

Mi ne ŝatas la elekton de vortoj *oriente* kaj *okcidente*. La vortoj *oriento* kaj *okcidento* indikas ĉefe du mondpartojn, Azion kaj Eŭropon. Kiam oni vivas en Budapeŝto, la oriento estas oriente kaj la okcidento estas okcidente. Bone ! Sed kiam oni vivas en San-Fransisko, la oriento estas okcidente kaj la okcidento estas oriente. Konfuzu !

Ĉu ne estus pli bone uzi la vortojn *eoste* kaj *ueste* (aŭ eĉ pli bone *ueste* kaj *malueste*) ? Oni trovas tiujn vortojn en

Je parle Espéranto — Flash-Marabout kaj en *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* de Peter Benson, sed ne en *Dictionnaire pratique d'Espéranto* de SAT-Amikaro. Ĉu tiuj du vortoj estas neologismoj, kiujn ni devas eviti ? Domaĝe !

P.S. La eosta-uesta akso malsamas la nordan-sudan akson. Tiu ĉi estas la akso de la tera rotacio kaj ĝi havas du polusojn, la nordan kaj la sudan. La eosta-uesta akso ne havas polusojn kaj estas nur direkta. Tiom da kialoj por eviti prilokajn terminojn kiel oriente kaj okcidente.

Respondo

Sylvain Auclair

Nenio malpermesas al vi uzi la radikojn *eost-* kaj *uest-*, kiuj havas la grandan avantaĝon komenciĝi per malsamaj literoj, sed ja estas neologismoj. Tamen, *orient-* kaj *okcident-* estas fundamentaj radikoj, kiujn sekve ne eblas malaperigi el nia vortprovizo, kaj mi persone ne tro ŝatas la ekziston de veraj sinonimoj — ni ne senutile ŝarĝu

la memoron de l' lernantoj.

Aliflanke, mi ne konsentas pri viaj kialoj. Oriento kaj okcidento estas unuavice direktoj, nur poste mondpartoj. Kaj ĉi-lastan uzon mi evitas, ĉar ĝi estas Eŭrocentrismo. Anstataŭ Proksiman Orienton mi prefere diras Okcidentan Azion. Tiel mi ne povas frenezige flugi okcidenten ĝis Oriento...

Etimologie, la radikoj *orient-* kaj *okcident-* devenas el latinaj participoj kun signifoj *leviĝanta* kaj *falanta*. En la franca, komparu la vorton *occident* kun la malnova verbo *occire*. Kaj por *Orient*, la franca foje uzas *Levant*, kaj la adjektivon *levantin*, kiuj estas tute klaraj vortoj, ĉu ne ?

Fine, mi demandas min pri la akceptebleco de *maluesto* (aŭ de *maleosto*). La demando estas : kiu estas la plej grava direkto, la matena aŭ la vespera ? Oni ja povus uzi multe pli ofte la prefikson *mal-*, kaj diri *malvespero*, *maltago*, *malnordo*, *malpaco*, *malvivo*, *malblanka* (legita en svedlingva informilo !), *malblua* (por oranĝa), k.a. Sed ĉio ĉi fine aspektus ridinda, ĉu ne ?

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj

Yvon Roux

Vintro malrapide venas sed tamen venas ! Trafu varman kaj amikan etoson kaj partoprenu la venontajn Montrealajn Esperanto-Kunvenojn.

Kiel antaŭe renkontiĝoj okazos ĉe la Montreala Esperanto-Domo, ĉe la kafejo *Esperanto* kaj ĉe Esperantistoj mem. Plej ofte ili okazas vendrede vespere.

Kontaktu nin ((514) 727-8758) se vi pretas organizi renkontiĝon ĉe vi. Ni plezure helpos vin.

Ni esperas, ke vi venos multnombre ; vi certe ĝuos ilin.

Se vi ŝatus, ke *La Papago* voku vin tiurilate, sciigu nin, sciigu nin, sciigu nin...

Sufiĉu la bla-bla-bla... legu la menuon de l' nova sezono en la *Kalendaro*, ĉe la lasta paĝo.

Renaissance de l'OJEQ

L'Organisation des jeunes espérantistes du Québec, l'OJEQ, est inactive depuis plusieurs années. En fait, la plupart des jeunes se sentent parfaitement à l'aise au sein de la S.Q.E., mais il nous avait fallu fonder l'OJEQ pour pouvoir accueillir le Congrès international des jeunes espérantistes à Montréal en 1992.

Mais l'OJEQ renaîtra peut-être. En effet, une assemblée générale aura lieu le dimanche 13 décembre à compter de dix heures au Café Espéranto (250, av. du Mont-Royal Est, à Montréal). Cette renaissance a été principalement orchestrée par Damir Metz-Fleury, avec l'aide de son père. Tous les jeunes espérantistes (moins de 30 ans) sont invités à adhérer à l'OJEQ pour pouvoir voter.

Deux évènements ont particulièrement poussé les organisateurs à tenir cette réunion. La première est la mainmise de l'idiste Martin Lavallée

Rencontre pour les MEKs... et pour les filles : nouvelle saison, à l'arrivée de l'hiver — car il arrivera, c'est sûr. Venez vous réchauffer en participant aux nouvelles rencontres du club espérantiste de Montréal. Les rencontres auront lieu au siège de la S.Q.E., au Café *Esperanto*, sur le Mont-Royal et chez des espérantistes.

Si vous souhaitez inviter les espérantistes chez vous, veuillez nous en informer ; nous serons heureux de vous aider à organiser cette soirée.

Si vous souhaitez que *Le Perroquet* vous téléphone pour vous rappeler chacune des rencontres, faites-le-nous savoir ((514) 727-8758).

Nous espérons vous y voir nombreux et nous sommes convaincus que vous y prendrez un grand plaisir. Prenez connaissance de l'horaire à la dernière page.

English by the Bay

Lu dans deux restaurants californiens. « This restroom is for use of our only customer » (Hidelberg Restaurant, Berkeley). « Special today: grounded beef » (Bavarian Village Restaurant, Emeryville). À noter : ces établissements ont fait faillite... [*esperanto USA*, vol. 34, n° 5, 1998]

Des nouvelles en ligne

Peut-être avez-vous remarqué, à la fin de certains des articles de *La Riverego*, la mention *Retaj bultenoj de K.E.A.* Il s'agit de nouvelles envoyées par l'Association canadienne d'espéranto, par l'intermédiaire du courrier électronique, à tous ceux qui en font la demande. Certaines nouvelles concernent spécifiquement l'Association canadienne d'espéranto, d'autres, le monde espérantiste en général. Les nouvelles sont en espéranto et sont précédées d'un résumé en anglais. Pour vous abonner, envoyez votre demande à Paul Hopkins, à l'adresse : <phopkins@uvic.ca>.

Sveda ĵurnalo kunlaboras kun SEF

Franko Luin

La ĉefa sudsveda ĵurnalo *Sydsvenskan* komencis kunlabori kun Sveda Esperanto-Federacio (SEF) kaj ĝia interreta Kiosko. *Sydsvenskan* proponas al siaj interretaj legantoj diversajn kolektojn da ligiloj, inter alie al aliaj gazetoj en la mondo. Ek de la 22^a de oktobro, tio estas la Kiosko de SEF. La uzantoj havas la tutan tempon la senton, ke ili troviĝas ĉe la gazeto, kvankam ili moviĝis al la paĝoj de SEF kaj pluen al gazetoj en la mondo.

Sydsvenskan proponas al siaj legantoj la saman elektelecon uzi la svedan, Esperanton kaj la anglan, kaj kontribuas per tio nerekte al informado pri Esperanto, ĉar la komencaj paĝoj de Kiosko invitas la vizitantojn informiĝi pri Esperanto, ĉu per vizito al la informpaĝoj de SEF (sur la sveda paĝo), ĉu per vizito al *esperanto.net* (sur la angla paĝo), kie ili povas pluelekti, en kiu lingvo ili volas legi la informojn pri Esperanto. [*El Interredaktore*]

La Riverego 7

Kalendaro de venontaj okazaĵoj

- 11^a de decembro. **Zamenhofa Festo. Komuna manĝo** ĉe la Montreala Esperanto-Domo (6358-A, rue de Bordeaux), 18h. Kultura Vespero.
- 13^a de decembro. Jarkunveno de **KEJO** (Kebekia Esperantista Junulara Organizo), ĉe *Café espéranto* (250, av. du Mont-Royal Est, Montréal). 10h.
- 15^a de decembro. **Kluba kunveno** ĉe *Café espéranto*. 19h30.
- 27^a ĝis 30^a de decembro. 6^a **Togolanda Esperanto-Kongreso**. En Lomé (Togolando).
- 27^a de decembro ĝis 3^a de januaro de 1999. 42^a **Internacia Seminario**, en Kassel, (Germanio). Temo : *Dependeco : faktoj, sekvoj, solvoj*.
- 27^a de decembro ĝis 3^a de januaro. **Internacia Festivalo** por mezaĝuloj, en Saarbrücken (Germanio).
- 10^a ĝis 23^a de januaro. 15^a **Aŭstralia Esperanto-Somerlernejo**. En Melbourne (Aŭstralio).
- 22^a de januaro. **Kluba renkontiĝo** en la Montreala Esperanto-Domo (6358-A, rue de Bordeaux). Temo : *prezento de filmoj, memoraĵoj kaj fotoj en Esperanto*. 19h30.
- 22^a ĝis 24^a de januaro. **Dolĉaja Semajnfino**. En Auvers-Saint-Georges (Francio).
- 27^a de januaro ĝis 3^a de februaro. 4^a **Tut-Amerika Kongreso** de Esperanto, en Bogoto (Kolombio).
- 12^a ĝis 15^a de februaro. Unua Rijeka Internacia **Junulara Karnavalumado**. En Rijeka (Kroatio)
- 20^a de februaro. **Kluba aktivado**, ĉe Parko Mont-Royal. *Glitado kaj glitkurado* (ekstere). *Historio de la parko* (chalet de l'observatoire). 14h.
- 5^a ĝis 9^a de marto. **Festivalo de Esperanta Arto**. En Kijiv (Ukrainio)
- 19^a de marto. **Kluba renkontiĝo**, ĉe Patriko, 1043, av. Pratt, Outremont (metrostacio Outremont) (514) 341-3449. Temo : *Kiel iĝi riĉa kaj kiel ekigi entreprenon*. 19h30.
- 31^a de marto ĝis 6^a de aprilo. Internacia **Junulara Festivalo**, en Rimini (Italio).
- 2^a ĝis 5^a de aprilo. Dua **Fromaĝa Semajnfino**. En Pierrefontaine-lès-Blamonts (Francio)
- 23^a de aprilo. **Kluba renkontiĝo** ĉe Daniela, Ivano kaj Rumen, 7122, rue Fabre, app. 1 (metrostacio Fabre), (514) 722-8758. Temo : *ideala lando*. 19h30.
- 24^a kaj 25^a de aprilo. Internacia **Festivalo de Kanto kaj Kulturo**. En Karlovo (Bulgario).
- 13^a ĝis 16^a de majo. **Printempa Renkontiĝo**, en Eijsden/Mesch (Nederlando). Temo : *Eŭroregionoj*.
- 13^a ĝis 16^a de majo. **Pied-migrado**. En Bouresse (Francio).
- 21^a de majo. **Kluba renkontiĝo** en la Montreala Esperanto-Domo. Temo : *Diversaj tekstoj en Esperanto*. 19h30.
- 18^a de junio. **Kluba renkontiĝo** ĉe *Café espéranto*. Konkurso de *tablofutbalo*. Temo : *viaj preferitaj kafejoj kaj restoracioj en Montrealo*. 19h30
- 30^a de junio ĝis 4^a de julio. **FREŜO** : Frusomera renkontiĝo esperantista ŝokanta obstinulojn, en Olŝtino (Pollando).
- 31^a de julio ĝis 7^a de aŭgusto. 84^a **Universala Kongreso**, en Berlino (Germanio).
- 9^a ĝis 16^a de aŭgusto. 55^a Internacia **Junulara Kongreso**, en Zánka (Hungario).
- 14^a ĝis 21^a de aŭgusto. Renkontiĝo de **Esperantistaj Familioj**. En Zielona Góra (Pollando).
- 26^a ĝis 28^a de aŭgusto. Seminario. *Koboldoj en folkloro*. En Iisalmi (Finnlando).
- 27^a de junio ĝis 2^a de julio de 2000. 10^a Internacia Esperanto-Kongreso, en Istanbul (Turkio)
- 11^a ĝis 18^a de julio. 85^a **Universala Kongreso**, en Tel-Avivo (Israelo).
- Somero 2000. 56^a Internacia **Junulara Kongreso**, verŝajne en Honkongo.
- Somero 2001**. **Universala Kongreso**, en Zagrebo (Kroatio).

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj : (514) 272-0151 aŭ esperanto@sympatico.ca.

Amnestio internacia

U. Paul Ronald

Mi estas jam 20 jarojn membro de Amnestio Internacia (A.I.), kaj specialiĝis pri la mortpuno.

A.I. estas tutmonda organizo por antaŭenigi la homajn rajtojn, kiel listigitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita antaŭ 50 jaroj. Ĝin verkis montreala juristo, D^{ro} John Humphrey. Li ankaŭ fondis la kanadan sekcion de A.I. en 1973, do antaŭ 25 jaroj.

La celoj de A.I. estas ĉefe la jenaj :

1. Akiri la liberigon de « malliberuloj de konscienco », do personoj enkarcerigitaj pro siaj skribaĵoj aŭ religio k.t.p., kiuj neniam uzis aŭ rekomendis perforton.

2. Akiri fruajn kaj justajn procesojn por politikaj malliberuloj ; kaj por iu ajn enfermita sen akuzo aŭ proceso.

3. Kontraŭi la mortpunon kaj torturon de iu ajn malliberulo.

La plej ofta metodo enketi estas la sendo de miloj da leteroj de multaj landoj al la prezidento aŭ ĉefministro. Tio ofte efikas. Meze ni sukcesas ĉiutage liberigi po kvin personojn. Du-tri juristoj de la centra oficejo de A.I. en Londono kune vojaĝas al la koncerna lando kaj parolas kun diversaj oficistoj.

A.I. ricevis la Nobel-premion pri paco en 1977, kaj la premion de UN por homaj rajtoj en 1975. Tutmonde ni havas preskaŭ milionon da membroj kaj subtenantoj.

Por membriĝi aŭ donaci, oni kontaktu aŭ la franclingvan sekcion je (514) 766-9766, aŭ la anglan je 1-800-AMNESTY (Kanado estas la sola lando kun du sekcioj...).